



Kulturaj Kajeroj

É. MAHÉ →

DUMONATA INFORMADA KAJ KULTURA REVUO

Direktoro : H. MICARD, Prezidanto de la Kulturdomo de Franclandaj Esperantistoj, ÉPINEUX LE SEGUIN (Mayenne) - Tél. 1 - (Francujo)

JARABONO :

Simpla : 5 fkoj } Sendotaj al : Micard Henri
Bonfara : 10 fkoj } Kulturaj kajeroj
Épineux-le-Seguain (Mayenne)
C. C. P. Nantes 2349-62

(Vidu la liston de niaj perantoj sur pagò 4)

SEPTEMBRO - OKTOBRO

1962

5

KULTURAJ KAJEROJ

1962

Septembro - Oktobro

Dumonata informada kaj kultura revuo

REDAKCIA KOMITATO :

Sekretario :

P. Babin, 5, boulevard Buisson
Rochefort-sur-Mer (Franc.)

Komitatanoj :

René Watier
Paul Guillot
Frédéric Thébaud
Pierre Chevalier

La represo de artikolo el nia revuo estas permesata post interkonsento kun la redakcio. Oni bonvolu ĉiam citi la nomon « Kulturaj Kajeroj » kaj sendi ekzempleron de la revuo aŭ gazeto en kiu aperis la koncerna represajo.

ENHAVO

..

Novnaskito en Grésillon

La Internacia Atesto pri Kapableco.

Esperanto tra la mondo.

Eksterlandano vizitas Francujon :

Kulto de vino (II) - Nov Nir.

Intervjuo :

Kelkajn minutojn kun...
Juan Régulo-Pérez.

Nia enketo pri...

La Ciganoj (A. Frangeul).

Pri la Kulturdomo :

La Kulturaj Internaciaj Ferioj (R. Dupuis).

Granda pola tradukisto

Tadeo Boy-Zelenski (Z. Lutogiewski).

Fantaziaĵo :

Kial ili estas famaj ? (G. Feydeau)
(tr. de F. Doré).

Per via distro :

Nia Konkurso.

Bonhumoro.

KULTURAJ KAJEROJ

ne similas, ne similos al aliaj Revuoj.

KULTURAJ KAJEROJ

spegulos la vivon de nia Esperantista Kulturdomo.

KULTURAJ KAJEROJ

publikigos la plej gravajn prelegojn aŭditajn de niaj vizitintoj, kaj artikolojn de diverslandaj eminentaj esperantistoj.

KULTURAJ KAJEROJ

respondos al gramatikaj demandoj.

KULTURAJ KAJEROJ

prezentos konkursojn, kaj diversajn amuzajojn.

Ni deziras ke « Kulturaj Kajeroj » plaĉu al vi. Sendu viajn sugestojn, kaj kritikojn

H. MICARD.

La Internacia Atesto pri Kapableco

Jam de kelkaj jaroj la diverslandaj gesami-deanoj, kiuj vizitas la Esperantistan Kulturdomon okaze de la Aŭgustaj kursoj, bedaŭras, ke ili ne povas kunporti en sian landon ateston pri siaj lingvaj konoj. Fakte sur internacia kampo ekzistis nenio tia ĝis la starigo, fare de UEA, de la Internacia Ekzameno. Sed tiu ekzameno staras sur plej alta ŝtupo, kaj ŝajne kontrolas ne nur la esperantajn konojn sed ankaŭ la ĝeneralajn. Ĝi fakte staras sur la supra ŝtupo, super la plej altaj esperantaj landaj diplomoj. La ege malgranda nombro de la ĝisnunaj sukcesintoj tion montras. Mankis do intera ekzameno. Tiaj ekzamenoj ekzistas nur sur nacia kampoj organizitaj de naciaj asocioj.

De nun dek jaroj la Esp. Kulturdomo specialigis en la instruado de Esperanto. Krom la kutima periodo dediĉita al kulturaj prelegoj, ĝi ĉiujare organizas kursperiodojn. La kursoj origine starigitaj por francoj fariĝis, jaron post jaro, pli kaj pli internaciaj, pro tio, ke ili estis pli kaj pli vizitataj de eksterlandanoj, ĉefe la supera kurso kiu okazas (samtempe, kiel porkomencanta kaj praktika kurso) en Aŭgusto. La Komisiono por Instruado pripensis la aferon. Ĝi venis al la konkludo, ke la formo de la Supera Kurso devas esti adaptita al la diversnacia kursanaro kaj, ke venos la tempo, kiam estos necese starigi specialan examenon. Tiu tempo venis kaj, laŭ peto de eksterlandanoj, la Kulturdomo decidis iri novan paŝon kaj tial starigis la Internacian Ateston pri Kapableco.

La celo de tiu ekzameno estas kontrolo de la konoj de la ekzamenito pri la gramatiko, la vortaro, la historio de la movado kaj de la lingvo, kaj de liaj kapabloj pri preciza esprimado de sentoj kaj pensoj, pri kompreno de tekstoj ktp. La diversaj partoj de la ekzameno multe similas tiujn de la Atesto pri Kapableco organizita de la Franca Esperanto-Instituto sed ĝi estas adaptita al ne-francaj ekzamenitoj. La skriba parto kon-

sistis el : 1) respondoj al demandoj pri la gramatiko, la lingvo, la ideoj esprimitaj, post studo de teksto (la ĉijare elektita teksto estis el « Dialekto, Dialektiko » de Dalmaŭ ; 2) verkaĵo pri romano (ĉijare « Mistero Minora » de Szilagyí) : studo de la ĉefaj karakteroj, de la stilo de la aŭtoro, ktp. La parola parto konsistis el : 1) prezentado de iu gramatika punkto (uzo de la akuzativo, epiteto kaj predikativo, leĝoj de kunmetado, ktp.) ; 2) korektado de provtasko verkita de komencanto ; 3) legado kaj klarigado de teksto ; 4) konversacio pri temo ĝenerala elektita de la ekzamenantoj.

Tiun examenon sukcesplene trapasis S-ro MAGORI, el Munkeno, kaj la Komisiono por Instruado, kiu lin deklaris akceptita, gratulas lin ne nur pro la fakto, ke li estas la unua sukcesinto, sed ankaŭ pro la granda laboro farita de li dum la nur trisemajna preparado. Ĉar, pro la malfrua decido pri la organizado de tiu ekzameno, S-ro Magori ĝin preparis nur dum la trisemajna kurso. Kompreneble liaj esperantaj kapabloj jam taŭgigis lin por fina sukceso. Sed montriĝis necesa longa preparado. Pro tio la Komisiono por Instruado preparas precizan studprogramon, kiu estos baldaŭ je la dispono de la interesatoj ; la studperiodo en Grésillon estas nur la necesa finpreparado de la ekzameno.

Per tiu Internacia Atesto pri Kapableco, la Kulturdomo ne intencas anstataŭigi iun ajn jam ekzistantan examenon. Ĝi nur prenas lokon bedaŭrinde liberan. La diplomo estas atribuita de sendependa organizaĵo rajtigita tion fari per sia ĝisnuna agado sur kampo de instruado. Ĝia valoro dependos de la nivelo, kiun la Komisiono deziras daŭre doni al ĝi kaj de la nombro de la interesatoj. Ni esperas, ke ili estos multaj.

Esperanto tra la Mondo



La 47-a Universala Kongreso

— Ĝi okazis en Kopenhago kun la partopreno de 1550 kongresanoj el 36 landoj. Samtempe, okazis la 1-a Scienca Konferenco dum kiu 9 sekcioj studis la lingvan problemon en la Scienco. Ege valoraj prelegoj estis faritaj. Samtempe ankaŭ, la 47-a Internacia Kongreso de blindaj esperantistoj arigis 70 personojn el 9 landoj.

— Jen la nova estraro de U.E.A. : prezidanto : Prof. Dro Hideo Yagi (Japanujo) ; vic-prezidantoj : Sroj Holmes (Britujo) kaj Wensing (Nederlando) ; ĝenerala sekretario : Prof. Dro Ivo Lapenna ; estraranoj : Dro Albault (Francujo), Sroj Woessing (Nederlando), Ziegler (Danlando) kaj Czuba (Pollando).

— Dum la solena malfermo, parolis tre favore por Esperanto la ministro por Instruado de Danlando, Sro K. Helveg Petersen.

— Ĉiuj tagĵurnaloj de Kopenhago aperigis informojn, raportojn, intervjuojn pri la kongreso. La gazeto « Politiken » aperigis ĉiutage rubrikon en internacia lingvo.

— Okazis la kutimaj manifestacioj : literatura kaj oratora konkursoj, distraj vesperoj, belaj ekskursoj, fakaj kunvenoj.

— Kreĝis Unuiĝo de Esperantistoj laborantaj en radio kaj televido.

— La libro de Prof. Waringhen « Lingvo kaj Vivo » estis proklamita la esperanta « libro de la jaro ».

— La kongreso 1963 — kiu certe estos « giganta » kongreso — okazos en Sofio (3-10 VIII) kaj la Junulara Kongreso en Vraca (Nordokcidenta Bulgario), de la 27-a de Julio ĝis la 3-a de Aŭgusto.

La 35-a SAT-Kongreso en Vieno

— Ĝi okazis en Vieno kun partopreno de 500 personoj el 18 landoj. Kongreseto arigis 32 infanojn.

— Ĉe la malfermo parolis la urbestro de Vieno, S-ro F. Jonás, kiu mem estas esperantisto kaj ano de SAT.

— La laborkunsidoj, ekskursoj kaj distraĵoj tre bone sukcesis.

Prelegseminaro en Frostavallen

— 102 personoj el 17 landoj ĉeestis. La

prelegoj temis pri la ĝenerala laboro de UNESKO.

Internacia Feria Esperanto-Kurso en Helsingor (Danlando)

— Ĉeestis 150 personoj el 17 landoj. Speciale menciinda estas la kurso de S-ro Sogaard — Hansen, kiu instruis komencantojn el pluraj landoj pere de la nova kurso « Esperanto, la naturmetodo ». S-ro Morariu preparis novajn Cseh-metodajn ĝeinstruistojn.

Eldonaĵoj el Ĉinio

— Ĉina Esperanto-Ligo eldonis lasttempe : « Pejzaĝoj de Ĉinio », grandformatan albumon 54-paĝan kun 48 elektitaj fotoj el kiuj 12 multkoloraj ; « Pitoreskaĵoj de Pekino », 12 multkolorajn poŝtkartojn kun vidaĵoj pri la ĉefurbo ; « La kultura vivo de la ĉinaj laboristoj kaj oficistoj », 72-paĝan albumon kun pli ol 90 fotoj. Adreso de Ĉ.E.L. : poŝtkesto 313, Pekino.

Nova Literatura Revuo

— UEA eldonos trifoje en la jaro revuon : « Monda Kulturo », pri literaturo, teatro, filmo, baledo, artoj ; la unua numero devas eliri fine de oktobro. Pagu de unu la abonon (15 ned. guld. aŭ 60 steloj).

4-a Internacia Geografia Semajno

— Ĝi okazis en Husmandskolen, apud Odense, de la 28-a de Julio ĝis la 4-a de Aŭgusto. Ĉeestis 30 personoj el 7 landoj. La programo konsistis el prelegoj, filmoj, ekskursoj. Tibor Sekeli sendis sonbendon, ĝisdatan raporton el Etiopio pri sia « Karavano de Amikeco ».

Korespondado kun usonaj studentoj

— Usonaj komencantoj, plejparte gestudentoj de la Universitato de Harvard deziras korespondi. Skribu al : Harvard Esperanto-Klubo, Quincy House, Box 8, Harvard University, Cambridge 38, Massachusetts, Usono.

Famekonatan francan brandon KON-JAKO disvendas s-ano DESPEYROUX, 200 rue Fbg St-Denis, PARIZO 10a. Aŭtentikeco kaj altkvalito garantiataj. Ekspedo ekde la produkto en ĉiujn pagipovajn landojn. Informpetu !

EKSTERLANDANO vizitas Francujon

KULTO DE VINO

(dua tra po)

Beaune estas unu el la patrujoj de la burgunda vino. Por barbara gusto ĉiu vino similas al alia. Sed ne tiel ĝi gustumas al palato de fakulo. Ĉiu speco de tero donas alian vinon, la iomete acidetan, sed malpli pikan aŭ aroman kaj ne dolĉetan. Tian, kies efikon oni tuj sentas kaj tian, kiun oni rimarkas nur post paso de proksimume duonhoro. Gustumado de vino estas do okupo grava kaj elekto de konvena vino por konvena okazo estas afero de serioza konsidero. Vino estas la plej grava ŝatokupo de la burgundano, vera kulto. — « Vinon oni gustumas per ĉiuj kvin sensoj », diras sinjoro Perriaux, kiu estas interalie ankaŭ instruisto en Dijon, sed ĉefe li estas amanto de Burgundo : « Kaj la ligo inter vino kaj la homo estas efektive afero plej sankta ». Vi devas kompreni, ke tiuj vortoj estis diritaj en unu el la vinkeloj de la urbo Beaune, en volbita kelo, kaj glasoj de vino staris preparitaj sur bareloj, kiuj staris sur flankoj. « Antaŭ ĉio - la palpo. Vi ĉirkaŭprenas la glason, provas enpenetri tra ĝia vitro, tuj la sekretan misteron de la vino, kiun la glaso enhavas. Grandan signifon havas do formo de la glaso, ne subtakus tion ! Due - la aŭskulto. Ĉu vi komprenas la valoron de vino, kiu ion movas la glason kaj ĉu vi aŭdas, kiel sonas la vino ĉe la glasvando ? Kaj komprenu la okuloj ! Oni devas vidi la flagron de la lumo interne en la vino, koloroj de la ĉielarko, kiuj estas en ĝi, ĝian klarecon ! Tiuj ĉi tri sensoj donas al vi preskaŭ ion, kion estas eble doni.

Restis ankoraŭ du sensoj. La unua - la flaro. « Vi enspiras en viajn flartruojn la aromon de la vino. Sed tiun senton akompanas laspeca doloro, ĉar ĝen alvenas aliaŭa momento de la gustumo. Kaj kun fermiĝintaj okuloj, kun flargloboj plenaj de vino amoro vi gustumas ». Kaj ankaŭ sinjoro Perriaux farigas malgaja, fermas siajn okulojn kaj trinkas la vinon, kiu estas en lia glaso. « Mi forgesis diri » li ankoraŭ aldonas : « Vera fakulo de gustumado provas nur unu gloton. Tio al li sufiĉas. La ĉefajo estas la interna sinpreparo antaŭ la gustumo ».

Tio ĉi estas kulto, ĉu ne vere ? Kaj se ĝi estas kulto, ĝi estas kulto kultura. Kaj homo, kies rilato al la vino estas tia, ne estas drinkulo, ne estas epikurano. Li simple ĝuas la vivon per ĉiuj siaj sensoj.

Beaune estas urbo de artoj. Pli Beaune oni jam povas diri, ke ĝi estas provinca urbo, sed tio ne estas maldaŭdo ! Plejmulto de homoj en la mondo vivas en « provinco » kaj ĉi ĉi vivo ne estas sole spiro al la « urbo » ! La

historio iam preferas tiun urbon, iam alian. Vi ne trovas lokon, kies horo iam ne venos. Tiel ankaŭ Beaune estis konata en fino de la mezepoko kiel tre grava fortikigita urbo kaj ĝiaj fortikaĵoj restis ĝis nun. Ili ne estis detruitaj, ĉar la historio preterpasis tiun urbon kaj ne montrigis bezono de tiuj fortikaĵoj. Hodiaŭ ili estas denove gravaj : la profundaj keloj en ĝiaj dikaj muroj servas kiel idealaj vinkeloj. Pri ili oni povas ĝuste diri - laŭ Jugosto XIV, 14 : « De fortajo devenis dolĉo. »


Malgusta estas tiu komparo pro la fakto, ke tiu vino estas acida kaj ne dolĉa. Kaj ĉu ne estus rave, se la historio estus preterpasinta laŭ simila maniero ĉiujn fortikaĵojn, kiuj estas en la mondo kaj ŝanginta ilin en vinkelojn ? Pli bonaj estus ebruloj ol invalidoj en la mondo.

Laŭ la statistiko la dua monumento post « L'Etoile » de Parizo, kiun vizitas la plej multaj turistoj en Francujo, estas « Hôtel Dieu », la antikva hospitalo de Beaune. Kaj ĝi ankaŭ meritas tion. Ĉi estas unu el restaĵoj de gotika arto, kiu restis preskaŭ sen iu ŝango. La speciala konstruo de ĝia artistia ligna tegmento, la malgrandaj tegmentetoj el ligno skulptitaj super ĉio, la multkolora belegaj tegmento, farita el malgrandaj tegoloj laŭ speciala arto burgunda, speciala arto de la finiganta mezepoko, ŝanĝas tiun ĉi seriozan domon - en kiu dum ĉiu tempo estis kaj estas malsanuloj - en amindan ludilon. Potencaj lignaj traboj tenas la plafonon : la elstaraj, kiuj estas ĉe la muro, havas pro iu kaŭzo formon de krokodila kapo. En la brilanta apoteko enestas multaj antikvaj boteloj, pistiloj kaj pesiloj, kiuj devenas de la unuaj tagoj de ekzisto de la instituto. Kaj super ĉio flandraj pentraĵoj, pentraĵoj tiel delikataj, ke oni rekomendas rigardi la plej malgrandajn detalojn per lupeo, por ĝui la delikatecon kaj precizon de plenumo.

Inter la centra masivo de okcidento - onda, monteta - tereno kaj la jurao de la alpoj en oriento - montoj, neĝoj, ĝermangentaj popoloj - la longforma valo de Saône. La rivero fluas inter grenkampoj, vitgardenoj, malgrandaj urbetoj. Trankeviljo, la eterna bildo de fiŝistoj sur riverbordoj. Vidalvide bruas bormaŝinoj, borantaj nafton.

Mi fidas al Burgundo.

DOV NIR.



BEAUNE : Hôtel-Dieu

(Foto Legrand - Reproduktita kun afabla permeso de S.I. Beaune)

(Ĉapitro el la libro : « Nofej Carfat » (Pezaĵoj de Francujo) de Dov Nir, eldonita de « Massada » en Jerusalemo. Kun permeso de la aŭtoro tradukis el hebrea Ota Ginz en Kirjat Jam).

INTERVJUO

Kelkajn minutojn kun...

JUAN RÉGULO - PÉREZ

« Kunhelpu pluporti la torĉon ». Tiu alvoko de eldonisto J. Régulo-Pérez nun fariĝis fama ĉar ĝi de kelkaj jaroj aperas sur la Esp. revuoj. Despli agrabla estas la pluportado de tiu torĉo, ke la eldonaĵoj de STAFETO estas tre diversaj kaj ĉiam altvaloraj kaj bonege prezentitaj. Multaj el tiuj eldonaĵoj jam elĉerpiĝis, feliĉe por la eldonisto sed bedaŭrinde por la novaj esperantistoj. Kiu ne bedaŭras la malaperon, ekzemple, de *Koko krias jam*, de Szilagy, aŭ de *El la maniko* de Rossetti? La plejmulto el la « stafetaĵoj » ricevis grandan sukceson. Jam konataj, aŭ poste famigintaj nomoj brilas apud la titoloj : J. Baghy, G. Waringhien, P. Neergaard, W. Auld, M. Boulton, F. Szilagy, R. Rossetti, J. Francis, E. Urbanova, B. Ragnarsson, T. Sekelj, E. Privat, E. de Kock, S. Urban, R. Bernard, k.a.

Sro Juan Régulo-Pérez, universitata docento en la Kanariaj Insuloj, membro de la Akademio de Esperanto, kuraĝe prenis sur sin la ege pezan taskon eldoni librojn. Ni esperas, ke la suba intervjuo permesos al niaj legantoj pli bone konatiĝi kun tiu viro, kies sindonemo meritas ne nur aprobojn sed ankaŭ kunhelpon.

—o—o—o—o—o—

Cu via profesio estas la fonto de via intereso pri Esperanto, aŭ ĉu Esperanto estas por vi, ne distro, sed rimedo por kompletigi vian vivon ?

De ĉiam mi ŝatis rilatiĝi kun homoj alilandaj, alimoraj, alikulturaj. Kiam, en mia 18-a jaro, Esperanto sin proponis al mi, unue la lingvo sed baldaŭ poste ĉefe ĝia interna ideo tiel altiris min, ke la tempopaso nur kontribuis pliprofundigon de tiu altireco. Por mi esperanto jam « venkis », kaj iom post iom ĝi fariĝis unu el la ĉefaj konsistigaj faktoroj de mia persona mondo.

Antaŭ ol zorgi pri eldonado via priesperanta aktiveco estis granda. Kial venis al vi la ideo starigi novan eldonejon ?

Odoro de presinko ĉiam estis al mi tre agrabla. Kiam, en 1950, mi ekeldonis gran-

dan trivoluman libron pri la historio de mia insularo en hispana lingvo, por kies presado mi devis kunhelpi mian bopatron ekipi modestan malnovan presejon, kiun li posedis, tiam mi povis konstati, ke per malmulte da aldona mono la presejo povus ankaŭ presi en esperanto. Tiel en 1952 aperis mia unua eldono en nia lingvo.

Mi estas certa, ke niaj legantoj ŝatus scii, kiel funkcias eldonejo. Kiuj estas la administraj zorgoj de eldonisto ?

Se oni havas monon, la administraj aferoj de ordinara eldonisto ne estas aparte komplikaj. Sed STAFETO komencis tute sen mono kaj sen sperto. *Kvaropo*, la unua titolo, aperis per pruntita mono (dankinde sen interezo) ; baldaŭ ĝi montriĝis eldonsukceso, kaj per la reveninta mono mi povis pagi la pruntan, denove pruntepreni kaj tiel daŭrigi. Nur de antaŭ du-tri jaroj STAFETO ĝuas sendeficitajn financojn, kaj nun ĝi povas ekvilibre, fortikafide alfronti novajn kaj pli gravajn taskojn.

Kiamaniere vi elektas la eldonotajn verkojn? Ŝajnas, ke vi antaŭvidas « seriojn ». Ĉu tiu antaŭvido dependas de la elektitaj verkoj, aŭ ĉu vi elektas la verkojn konforme al la antaŭvido ?

La elektado de eldonotaj verkoj estis komence iom hazarda, sed ĉefe min gvidis la boneco de la manuskripto. Mi ne havis sperton pri la preferoj, bezonoj, konsumkapabloj k.c. de nia « lando ». Tiam ĉefe min orientis kaj konsilis jamaj verkistoj kaj eldonistoj, el kiuj mi volas nun danke mencii amikojn Reto Rossetti, Gaston Waringhien kaj Teo Jung.

La « seriojn » mi starigis por kunigi similĝenraj, parencometajn pecojn kaj tiel proponi al legemuloj, librovendistoj ktp. elementajn selektodirektivojn ; sed, samtempe, por iel profiti tiun homan econ, kiu puŝas kelkajn mendi libron de serio, kiun ili neniam aĉetus singulare, nur pro tio, ke ilin agacetas « truoj » en la « kolekto ».

Cu vi facile trovas eldonindajn verkojn ? Cu la aŭtoroj proponas mem siajn verkojn ?

Jes ja! Min inundas eldonproponoj, preskaŭ ĝis sufoko. Ĉefe aŭtoroj proponas siajn kreaĵojn; sed mi ankaŭ ricevis proponojn faritajn de aŭtoramikoj, de rondoj kaj societoj, de verkistoj, kiuj noble rekomendis kapablan kolegon, kiu mem ne kuragiĝis elpaŝi. Multfoje mi devis rifuzi eldonproponojn; komence mi jesis al ĉiu manuskripto, kiun mi konsideris eldoninda, sed laste, kiam bonaj titoloj sin proponis, mi devis klarigi al la koncernuloj la internan situacion de Stafeto kun promeso de eldonprobablo por malproksima dato, se post tio ili insistas aperi sub la emblemo STAFETO.

Pluraj el viaj eldonaĵoj jam elĉerpiĝis. Oni kutime diras, ke la esperantolingvanoj ne estas legemaj. Kion vi opinias pri tio ?

Esperantujo estas ankoraŭ malgranda « lando », sed kontentige elvinta. Mi speritis, ke la esperantistoj konsistigas legeman « popolon », proporcie eble ne tro malproksime de la pinte legemaj landoj de Eŭropo.

Kia speco de libroj pli allogas la legantojn ?

La legantojn, laŭ mia sperto, nepre allogas « bonaj » libroj. Kiam oni proponas bonan libron, ĝi kontentige debitiĝas. La koncepto « bona » inkluzivas, krom — kompreneble! — interesa enhavo, ne malĉefe lingvan korektecon, stilan impeton, vervon. k.a. Mallonge : esperanta libro devas kunflui la kriteriojn, kiuj validas por selektado de liberaj, respondecaj nacilingvaj eldonoj en kulturaj landoj.

Cu la prezento, la « eksterajo » de libro ludas gravan rolon ?

Nepre. Kaj tial STAFETO ĉiam ame zorgis ankaŭ tiun aspekton, en kiun mi inkluzivas adekvatan tipografian veston (legeblo, allogo, grandado de la litertipoj), kvaliton de la papero, arkitekturon de la masoj (larĝo de marĝenoj, blankaj paĝoj k.s.), kovrilojn, dekoraciojn ktp.

Kiuj estas la perspektivoj de la eldonado de esperantaj libroj ? Cu la plureco de eldonejoj malhelpas la disvastigon de la esperanta literaturo, versajne plialtigante kostojn ?

Laŭ mia opinio la plureco de eldonejoj nur povas pozitive puŝi la disvastigon de la esperanta literaturo, ekvilibrigi la prezojn, estigi noblan kaj prestiĝigan konkurencon kaj ĉiel profiti al nia propra kulturo. Disfoldado de eldonejoj kaj eldonaĵoj estus granda avantaĝo, konstanta alarmado, altirado de atento, legoveka politiko. Tio nepre kres-

kigus la simbiozon inter publiko de unu flanko kaj verko-eldona agado de alia. Dum la mangado venas apetito...!

Kiuj estas viaj propraj projektoj ?

Daŭre deĵori je la servo de nia propra kulturo. Kaj, se Esperantujo helpas ankoraŭ pli efike kunporti la torĉon, starigi kapablan eldonejon, kiu ne devigos, kiel okazis ĝis nun, bonajn manuskriptojn ŝimi sur miaj bretoj pro duma neeblo plivastigi miajn esperanto-presajn rimedojn en La Laguna. Dum mankos al mi kompostmaŝino adaptita al nia lingvo, mi jam ne povos plirapidigi la akiritan produktoritmon kaj tial titoloj eldonotaj dume senrime de stakigas. Estus bone se STAFETO povus kunlabori aŭ per kuneldono kun jam starigitaj aŭ starigotaj eldonejoj, aŭ simple per cedo aŭ interŝanĝo de manuskriptoj ktp. La esperantista popolo konsciu, ke ni devas, jes!, ĉiel disvastigi, propagandi nian lingvon — kaj neniam mi subtaksis tiun nepre necesan, ĉefan celon de niaj landaj kaj internaciaj organizaĵoj —, sed, kiel diris Zamenhof, tio « devas havi lokon apud la literaturo kaj ne anstataŭ la literaturo ». Ĉar ja nia literaturo, nia promesplena literaturo, estas, krom unuaranga ĉiurilata atuto, nepre unu el la plej solidaj kolonoj de la Movado.

P. BABIN.

LA LASTAPERINTAJ ELDONAĴOJ DE STAFETO

L. L. ZAMENHOF : Proverbaro Esperanta — provizita per indeksoj de C Rogister. Enkonduko de G. Waringhien.

« Nenio povas pli efike servi al la fortika unueco de nia parola kaj skriba lingvo, kiel la posedo, la aktiva posedo de komuna trezoro el figuraj, bildoplenaj kaj tutepretaj parolturnoj. » (G. Waringhien).

KAHIL GIBRAN : La Profeto — tradukita de Roan Orloff Stone.

« Penike, per siaj okuloj, kaj skribe per siaj penso kaj orelo, Gibran superis. Li enkondukis novan formon, prozopoeemon, en la araban literaturon, kaj fariĝis ĉefo inter la mezorientaj verkistoj. Rodin komparis lin al W. Blake; alĵaj al Dante kaj Tagore. » (E. James Lieberman M.D.)

Henri BAUPIERRE : Specimene — originale verkita — kun dekoracoj de Gérard Jaques kaj Mano-lo Millares — ricevis la **Argentan Spronon de Koko**, kiel **Aŭtoro de la Jaro**.

Kolekto de spritaj parodioj kaj pasticoj.

WILLIAM GILBERT : Planlingvaj Problemoj — (esperanto kaj la naturalismo) originale verkita — antaŭparolo de W. J. A. Manders.

« Gis nun nur malmultaj esperantistoj serioze okupis sin pri aliaj planlingvaj projektoj : eble — kaj espereble — ilia nombro pligrandiĝos dank'al ĉi-tiu studo de Gilbert. » (W. Manders).

NIA ENKETO PRI...

- LA ĈIGANOJ -



Pensante pri ciganoj, oni tuj elvokas tri banalajn bildojn : la unua estas eleganta violonisto, bele vestita, kiu muzikas inter la tabloj de ŝika nokta restoracio ; la dua montras brunan hispanan dancistinon, kun kastanjetoj, meze de suna pejzaĝo, kun akompano de gitara muziko ; la tria bildo prezentas malbone vestitan, nigrekulan kaj sendube malduran virinon, kiu ofte surhavas longan buntan robon. Ŝi sonorigas je via pordo por vendi pli malpli senvvalorajn objektojn, kaj ŝi, laŭdire, facilanime ŝtelas en birdkortoj.

Tiuj bildoj, kvankam tre malsamaj, lasas al ni komunan impreson de ia mistero, de nekonateco...

Kiu do estas tiu popolo ?

El kiu malproksima fabela lando li iam foriris ?

Depost kiam ĝi vagadas tra la mondo ?

Estas nun certe ke ĝi origine loĝis en okcidenta Hindujo, en la valo de la riverego Hindus. Pro kaŭzoj ne tre klaraj, antaŭ eble miloj da jaroj, la triboj migris al Persujo kaj Centra Azio, poste en la tutan Mezorionton kaj fine atingis Eŭropon (kaj eĉ pli malfrue Amerikon !).

La 7an de aŭgusto 1427, la unuan fojon ili estis alvenantaj ĉe la pordoj de Parizo, dum la « Centjara Milito ». Je tiu epoko, ili rakontis ke ili venis el lando nomita « Malgranda Egipto », ke la Papo kondamnis ilin pro diversaj cirkonstancoj, ke ili vagadis dum sep jaroj en la mondo, sen enliĝi... ke tamen ili havas papan ateston por ricevi helpon dum la vojaĝo.

Oni donas al la ciganoj, en la tuta mondo, tre diversajn nomojn, laŭ la malsamaj grupoj al kiuj ili apartenas. Plie, atentu bone ke ĉiuj nomadoj ne estas ciganoj ; ankaŭ ke en okcidenta Eŭropo, multaj familioj perdis parte la originajn trajtojn.

Dum la jarcentoj, la ciganoj, ĉie rigardataj kiel eksterlandanojn, estis ofte persekutitaj, kelkafoje tre kruele.

Pli ol 500.000 el ili estis mortigitaj de la Nazioj, dum la dua mondmilito.

Kelkaj tradicioj kaj kutimoj

Pri tiu temo, oni povus longe skribi !

Ni menciui nur kelkajn tipajn ekzemplojn. Cetere, ni tuj devas akcenti, ke kelkaj kutimoj estas ĉiam sekretaj kaj tute ne konataj de la « gadĝe » (ne-ciganoj).

Same kiel ĉiuj nomadaj popoloj, ili havis la organizon la plej primitivan : tio estas triba organizo.

La ĉefo estas kutime la spertoplena avo de la familio ; la familioj estas cetere tre ampleksaj. La maljunuloj ĝuas grandan respekton.

Tamen, la ekzisto de reĝo, aŭ reĝino, kiu havas aŭtoritaton sur ĉiuj ciganoj, estas nur fantazio de ĵurnalistoj.

Ni aldonu, ke la maljunaj virinoj havas praktike ankaŭ grandan povon.

La ĉefoj de triboj havas la privilegion eldiri juĝon. La juĝo de la ciganoj obeas al kodo de la honoro kaj de kutimoj, ne konataj de niaj tribunaloj, kompreneble.

Pro tio kelkafoje, okazas sangaj kvereloj kiuj — ankaŭ pro la « leĝo de silento » — restas senespere tute misteraj por la publiko... kaj la policistoj !

La porjuĝa sistemo de la ciganoj estas nomata « kris ».



Virino de la grupo « Kalderash »

Kutimo ankoraŭ multe sekvata, temas pri la detruo de posedaĵo de mortinto. Oni eĉ brulas la loĝveturilon post, la entombigo.

Aliflanke, la reveno de kelkaj mortintoj estas ofte timata ; oni nomas la revenantajn mortintojn : « mule » (singularo : « mulo »).

Ni parolu pri pli plaĉaj aferoj : pri manĝaĵo ! Estas bone scii ke la plej ŝatata nutraĵo de la ciganoj estas la erinaco nomata de ili : « niglo ».

Inter la « sekretoj », oni povas citi la signifon de la « patran ». La « patran » estas signalilo faritaj el folioj, branĉoj, ĉifonoj, metitaj sur la landvojo, en difinitaj lokoj. Per tiuj signaloj, la ciganoj komunikas al aliaj informojn utilajn.

Ekzistas ankoraŭ multaj kaj interesaj kutimoj pri ĉiuj cirkonstancoj de la vivo : naskiĝo, fianĉiĝo, edziĝo kaj ankoraŭ sendube iuj magiaj praktikoj.

Fine, ni diru ke kvankam la infanoj aspektas ĝenerale malpuraj kaj tute liberaj, la gepatroj multe amas ilin ; oni eĉ povas aserti ke la infanoj estas veraj reĝoj !

La lingvo

La ciganoj parolas lingvon nomatan « romani » aŭ « romanes ». Granda parto de la vortoj de tiu lingvo estas de hinda origino sed multaj vortoj estis prenitaj de la lingvoj de la landoj, kie restadis la diversaj triboj.

Bedaŭrinde, la ciganoj ne scipovas legi kaj ne ekzistas skribita literaturo (sed multaj legendoj, rakontoj en parola folkloro). Pro tio kaj pro la disiĝo de la ciganoj tra la mondo, la lingvo disfalis en multajn dialektojn kaj tre ofte, la ciganoj de malsamaj grupoj ne povas interkompreniĝi bone.

La metioj

Origine kaj tradicie, la ciganoj ege sukcesis en du profesioj : la komerco pri ĉevaloj kaj la laboro pri metaloj sed, en nia moderna mondo, tiuj du profesioj ne plu estas ĝenerale praktikeblaj.

Nun, tre ofte, ili estas korboplektistoj, revendistoj de malnovaj ferebobjetoj, ktp. La virinoj vendas de pordo al pordo tukajojn, puntaĵojn, korbojn.

Al tiuj okupoj, ni ne forgesu kompreneble, aldoni, en pluraj landoj, la muziko, la danco, la dresado de bestoj kaj la diveno de estonto por la trokredemaj personoj !

La muziko

Atentu bone, ke, kion oni nomas « ciganan muzikon »... estas verdire nek cigana, nek hungara folkloro ; Oni fakte ne multe konas pri la origina cigana folkloro (muzika). La hungara kantata folkloro estas ankaŭ tute alia afero.

La hungaraj ciganoj orkestroj ludas plejparte dancojn, kiel ĉarĉas aŭ « populistajn » melodiojn de « hungareca » karaktero.

En Rumanujo, ciganoj muzikistoj ludas dancojn de la rumana popolo

Tamen, oni povas diri, ke la ciganoj volonte uzas specialan muzikan gamon kaj ĉiam alportas al la interpretado sian rasan impeton kaj propran « manierismon ».

En la dancoj kaj kantoj de la hispanaj ciganoj, estas malfacile apartigi la influojn ciganajn, andaluziajn kaj arabajn.

La ciganoj majstras speciale, laŭ la landoj, pri violono kaj gitaro (ankaŭ zimbalo en Centra Eŭropo).

Religia sintenado

En ĉiuj landoj, la ciganoj ĝenerale adoptas la lokan religian kredon sed estas certe ke, apud tiuj religioj, ili ofte pli malpli konservas siajn tradiciajn kutimojn kaj prakredojn.

En Francio, la ciganaj pilgrimoj al Saintes-Maries-de-la-Mer kaj nun al Lourdes (por la katolikoj) estas bone konataj ; sed multaj francaj ciganoj apartenas al « evangeliismo » religio kaj tiuj lastaj estas tre prozelitimemaj.

La estonto de la ciganoj

En konkludo, mi deziras atentigi la legantojn pri la sociaj problemoj kreitaj pro la malfacila vivo de la tiel nomataj « filoj de la vento », en nia moderna kaj industria mondo.

Klarvide kaj sen antaŭjuĝoj, ni devas ekzameni iom tiun homan problemon.

En la landoj de Orienta Eŭropo oni nun provas devigi la ciganojn, laŭpove fiksiĝi progresive kaj ne plu nomadi. Tiel ili miksiĝas kun la popolo de la lando kaj, almenaŭ grandparte, vivas, studas kaj laboras kiel ordinaraĵoj civitanoj. La leĝoj celas rektan asimiladon.

En diversaj okcidentaj landoj, kie oni ne kutimas apliki tiel drastajn decidojn, oni komencas tamen provi, per diversaj sociaj rimedoj, plibonigi la vivon de la nomadoj por ebligi al ili restadi en puraj lokoj, kie ili facile trovos akvon kaj la minimumajn higienajn instalaĵojn.

La ĉefa tasko, laŭ mi, konsistas en instruado de la infanoj, baza kaj profesia edukado de la gejunuloj sed vere... multo estas ankoraŭ farenda !

En Francujo kaj Britujo, notinde, asocioj speciale interesiĝas pri studado de la cigana vivo.

Ni esperu ke, sen mallerto, sen troa rapideco, la oficialaj respondeculoj iom post iom, preparos lokon por la junaj generacioj de tiu senlanda popolo en la naciaj komunumoj kaj en nia moderna civilizacio.

A. FRANGEUL.

Pri la Kulturdomo

La Kulturaj Internaciaj Ferioj en Grésillon

4 - 17 Julio 1962

« Plus mon petit Liré que le Mont Palatin
« Et plus que l'air marin la douceur angevine. »

J. DU BELLAY.

Jen... mia tuta rememoro literatura pri la Loire-regiono, kiam fine de 1961 Profesoro P. Babin konfidis al mi arangon kaj gvidadon de la ĉi-supre menciita periodo en la Kulturdomo.

Tio tamen sufiĉis por min ekrevigi pri la orpalaj sabloj de l'rivero maldiligenta, pri ĝiaj mond-famaj kasteloj, kaj sekve de la invito : pri la spertinda, ĉiurilate bonfara atmosfero kutima en internacia kunestado esperantista.

Kaj nun, la trideko da personoj, kiuj la tuton partoprenis, plus la alia trideko, kiu ĉeestis nur parton, evidente ĝojas pro tio, ke ili pasigis tre agrablajn kaj instruajn libertempon en dolĉa regiono kaj en zamenhofa harmonio.

La kulturtemoj certe ne mankis :

S-ro Lutogniewski kaj la subskribanto prezentis la jenajn respektive :

Varsovio ĉefurbo de Pollando

Pri la pola tradukisto Tadeo Boy-Zelenski

Pola poezio en Esperanto

Nuntempaj kulturo kaj arto en Pollando

Muzikaj rememoroj

Renkonto kun la eterna Beethoven

Vojaĝo al Hispanujo kun la komponisto

Isaac Albeniz

El la pastia vivo de Franz Liszt

Frederic Chopin, la animo de l'piano

Muzikvojaĝo de Parizo al Marseille

Spertoj de tradukisto

Kun kelkaj filmoj, dekoj da pianoilustraĵoj kaj centoj da diapozivoj.

Tamen tio konsistigis nur parton de la restad-arangoj.

Ekskursoj al entute 12 famaj kasteloj kun i.a. la son-lum-spektaklo ĉe Le Lude : (eĉ nur tiu ĉi lasta por kiu ajn eksterlandano meritas la vojaĝon) la ĉarma gvidado de S-ino Chevery en pluraj okazoj, la raviga vizito al la zoologia ĝardeno en La Flèche, kies estro estas ankaŭ admirinda, la kromaj prelegaj kontribuoj de dano, francino, suomoj svedino kaj eĉ madagaskarano, la tre bonorda kaj famili-karaktara mastromado de ges-roj Micard kaj Roux, la ĉarmaj promenadoj, i.a. al la delmeno najbara, kiam bonaj koroj trovas eblon malfermiĝi kaj elverŝigi, — ĉu mi kuraĝu citi la enamiĝon de mia fileto Eric al nia kara spirite profunda samideano E. Gaudry, kio tiel forte impresis min kaj ĝojigis — ĉio tio, frukto de zamenhofa inspiro kaj laboro, sendube fariĝis amaso da riĉaj akirataj neforgeseblaj.

Hazarde troviĝis dum tiu periodo la Nacia Festotago : la 14-a de Julio. Bone ĝin travivinte ĉi-foje mi volas fari du komentojn tiurilatajn. Estis en Baugé, krom la nokta tradicia piroteknikaĵo, du tre diversaj momentoj, kiam antaŭ tagmeze plenumiĝis klasika ceremonio ĉe la monumento al la milit-mortintoj.

Ricevis dekoracion el la manoj de Senatano, 60-jara eksoficiro post kiam la respublika delegito elvokis liajn turrajn batalcirkonstancojn, epizodojn, kiuj fariĝis el Verdun, unu el la plej edifaj kaj meditigaj nomoj de l'homa civilizo. Kiom da doloroj signifas, en la dankalparolo, la dirita vorto : korp-al-korpe ?... Ni danku al D-ro Zamenhof, kies lingvo-monumento aperis « al la mond' eterne militanta » por ke ne plu aperu tiaj milit-monumentoj, postsignoj de buĉadoj korp-al-korpa kaj ceteraj eĉ se iel gloraj kaj heroaj.

Kaj jen finiĝis la matena ceremonio. La fajr-brigadistoj en ordo perfekta laŭordone « gardavis » kaj ekiris, sed baldaŭ fariĝis kvazaŭ forpromeneto kvankam poste ne sonis — almenaŭ ne al miaj oreloj — iu ajn ŝanĝ-ordono. Nu, la karajn kaŭzojn oni komprenas. La magnete altira kafejo kaj ĉies penso pri gaja daŭrigo de l'ncia festotago en paca tempo... per aperitivo !

Ni danku al la pioniroj de la Kulturdomo en Grésillon, kie floras homamo laŭ la instigo de nia lingva majstro, kie regas pejzaĝa trankvilo, kaj simple festas inter bravaj regionanoj paca senpretenda fajrbrigado !

Roland DUPUIS.

EL LETERO

« Ĉe vi en Francio la somero daŭras, ĉe ni en Suomio ĝi jam finiĝas. En momento de la fino ni repensas pri ĉio, kion la somero donis al ni. Alte elstaras la semajnoj pasigitaj en via Kulturdomo ; ili alte elstaras ne nur en tiu unu somero sed entute en niaj vivoj. Estas unika spertaĵo pasigi sian tempon en kadro pure Esperanta, en domo kaj en parko, kie ĉiuj afiŝoj estas esperantlingvaj kaj ĉiuj homoj parolas nur Esperanton.


« Ni gastoj pasigis belajn semajnojn kaj samtempe vi arangantoj havis dorsoplenan da laboroj ; ĉiuj vi arangantoj, sed eble plej multe vi geedzaj Micard, Ni havas grandan ŝuldon de danko al vi ĉiuj kaj aparte al vi du, pro tio, kion vi nun faris dum niaj semajnoj, kaj pro tio, kion vi antaŭe faris por entute krei la unikan Kulturdomo ».

(de S-ro TIETTI).

LA HOMO INFLUITA DE LA INSEKTOJ ?

ABELUJO ?

Ne, sed volbo de la plej granda vendohalo en Francujo, baldaŭ finkonstruita en Grenoble. Tiu volbo estas farita el antaŭfabrikitaj, « abel-nesto »-formaj elementoj.



FORMIKEJO ?

Ne, sed la plej granda lernejo en Eŭropo, ku estis konstruita en Alès (Gard). Sur sama loko troviĝas : duobla Klasika kaj Moderna Liceo, Teknika Liceo, porknaba kaj porknabina Kolegioj pri teknika instruado. Tiuj lernejoj ricevas entute pli ol 5.000 gelernantojn.



Granda pola tradukisto de la franca literaturo

TADEO BOY-ZELENSKY

(Resumo de prelego farita de S-ro Lutogiewski en Grésillon)

Por ni poloj, Tadeo Zeleński, pseŭdonime Boy, estis plej bona satira poeto, eminenta kritikisto kaj plej lerta tradukisto de la franca literaturo.

Li naskiĝis en Varsovio la 21-an de decembro 1874, filo de fama komponisto, pianisto kaj profesoro en la varsovia konservatorio. Post kvin jaroj la tuta familio transloĝiĝis al Krakovo, tiam centro de la intelekta vivo de la lando. Fininte mezlernejon, Zeleński studis medicinon. Li baldaŭ amikiĝis kun krakovaj poetoj kaj pentristoj. En 1900 li ricevis la titolon de doktoro pri ĉiuj sciencoj medicinaj. Por ankoraŭ pliprofundigi sian konon, li penis ricevi stipendion ebligantan al li forveturi al eksterlando. Li elektis Parizon. Li skribis post jaroj en felietono: « Ektroviginte en Parizo, en tiu urbo unika en la mondo, mi tuj eksentis, ke estus frenezo ĉirkaŭfrapi pulmojn kaj pripalpadi hepatitojn absolute samajn, kiel tiuj, da kiuj sufiĉe mi lasis en la patrujo. Mi komencis vagi tra Parizo. Estas en ĝi unu mirakla arango, nome la bordo de Sejno, kies randmuron en la distanco de kelkaj kilometroj okupas butikoj kun libroj. La promenoj fariĝis mia fikutimo ». Zeleński prenis librojn, kuris hejme kaj enlitiĝadis. « La amo ĉiam finiĝas en lito, ĉe la amo al libroj. »

Alia faktoro, plej ĉarma kaj nebula, de la proksimiĝo de Zeleński al la franca penso: la franca kanteto, la kanzono pariza. « Mi enamiĝis al ĝi ĉke la unua momento; mi enpuŝiĝis en ĉiun grupeton ĉirkaŭantan la stratan kantiston; mi fine hazarde venis tien, kie oni specife kulturas la kanton: al kabareto. »

La rezulto de la unujaraj francaj medicinaj esploroj estis kelkaj disertaĵoj pri la infanaj malsanoj, pri la protektado de la suĉinfanoj, kaj filantropia kuracista institucio fondita en Krakovo, nomita laŭ la franca ekzemplo: « La Guto de Lakto ». Kiel estro de « La Guto de Lakto » kaj samtempe asistanto en kliniko de la infanaj malsanoj, li agis ankoraŭ tri jarojn, ĝis la fondo de arta kabareto « La verda baloneto » en la krakova kafejo de Michalik, en 1905. Ravita de la unuaj programoj de la kabareto, li mem skribis kelkajn tekstojn kaj tiel fariĝis unu el la konstantaj aŭtoroj de la « Verda Baloneto ». Li kaŝis sin sub la hazarde elektita pseŭdonimo « Boy ». Dronante ĉiam pli profunde en la krea laboro, li rezignis pri la posteno de asistanto, kaj per tio pri scienca kariero en la fako de medicino. Sed ĉar la literaturo agado ne garantiis al li komence la vivrimedojn sufiĉajn, li okupis la postenon de fervoja kuracisto.

En 1909 aperis la unua franca libro tradukita de Boy. « La fiziologio de geedzeco » de Balzac, kaj en 1912 la sesvoluma kolekta eldono de verkoj de Molière. Tiuj libroj renkontis entuziasman akcepton de la krakovaj literaturaj rondoj, kiuj rekonis elstaran literaturiston. En la sama jaro aperos ankaŭ la tradukoj de: « La komedio pri la viro, kiu edziĝis al mulino », de A. France, « Dangeraĵoj Ligoj », de Laclos kaj « Elegioj » de Verlaine.

La pola literaturo kaj la kulturo de la 19-a jarcento formiĝis sub la signo de la romantikaj influoj. La mistikaj fluoj estis aprezataj, kiel la nacia trajto. Boy penis korekti la tiel formiĝintan menson de la socio kaj volis krei en la pola kulturo iun modelon, kiu transvivus la influojn de la kurantaj modoj. « Ni petu Francujon pri tio, kio mankas al ni. Ni havas proprajn grandiozajn romantikulojn; ni faru por ni el la francaj verkistoj niajn klasikulojn. » En 1919 li definitive adiaŭis sian kuracistan okupon kaj tutece dediĉis sin al la literaturo.

Antaŭ Boy, la Poloj jam konis kelkajn verkojn de Molière, Racine, Pascal, ktp. Sed Boy, la unua, tradukis Babelais, « Konfesoj » de Rousseau, « Jacques la Fatalulo » de Diderot, « Dangeraĵoj Ligoj » de Laclos, « Colomba » de Mérimée, « Granda Testamento » de Villon, verkojn de Montaigne, Pascal, Mariveaux kaj Musset. Al ĉiuj tradukitaj verkoj li skribis ampleksan enkondukon, cele al pli bona komprenado de la epoko, de la stilo kaj de la enhavo. La itala filozofo Croce diris, ke la tradukoj estas kiel virinoj: aŭ fidelaj kaj malbelaj, aŭ belaj kaj malfidelaj. Boy penis atingi « la fidelecon kaj vivon » de la tradukita verko. Li bonege konis la francan lingvon kaj ankaŭ la realaĵojn, morojn kaj kutimojn de la franca nacio. Li ankaŭ konis ĝis perfekte la terminologion de sia propra lingvo, ĉar li estis devigata uzi malfortajn terminologiojn, kiel la teologian (Pascal), la filozofian (Descartes), la bankieran (Balzac), la kuracistan (Molière), la presistan (Balzac), la skermistan, la navigacian, la ĉasistan, la terkulturistan, la buĉistan, la kuiristan; kaj oni ne forgesu, ke la juna Gargantua amuziĝis per 213 diversaj ludoj, kies nomoj eble eĉ por la francoj ne ĉiam estas konataj!

Kaj Boy ankaŭ venke trapasis alian malfacilaĵon: la diversecon de la stiloj de la verkistoj. Tiu-ĉe li devis iel enkorpiĝi sin en la aŭtoron, rigardi liajn verkistajn rimedojn, ŝteli ilin, havigi ilin al si kaj poste scipovi uzi ilin en alia lingva materialo. Kiam ni legas la tradukaĵojn de Boy ni bone sentas la frivolan krudecon de Babelais, la romantikecon de Gautier, la ironion de Voltaire, la humoron de Musset, la melankolion de Chateaubriant, la simplecon kaj dramecon de Pascal kaj la arkaismojn de Villon. Ankaŭ mirinda estas la sento de la poezia ritmo, kiel eble plej proksima al la originaloj.

Ĉe la komenco de la dua mondmilito Tadeusz Zeleński okupis la postenon de profesoro pri la franca literaturo ĉe la Universitato en Lvovo. Sed en Junio 1941, Lvovo estis okupita de la germanaj trupoj kaj kelkajn tagojn poste, la 4-an de Julio, kune kun aliaj reprezentantoj de la Lvova pola inteligentularo, Tadeo Boy-Zeleński estis mortpafita ĉe la deklivo de la t.n. Kadeta Monto.

Por ni poloj, Tadeo Boy-Zeleński restas por ĉiam ne nur homo, kiu venigis al Pollando la plej grandajn riĉaĵojn de la franca kulturo, sed ankaŭ simbolo de la frata amikeco inter la franca kaj la pola nacioj.

Zbigniew LUTOGIEWSKI.

FANTAZIAJO

Kial ili estas tamaj ?

(de Georges FEYDEAU Tradukita kaj plilongigita de Fernand DORE)

La homoj estas malspritaĵ, malspritaĵ, malspritegaj, ne parolu al mi pri tio ! Vidu, mi suferas. Ha ! Pascal prave diris : « La homo estas kano ! » Jes, kano, tio estas afero malsprita, malsprita, malspritega.

Nu rigardu la homon ; li, malforta estaĵo, li ĵugas la aliajn homojn, li famigas ilin ! Kaj kiujn li elektas por tio ?... ĉiam konatajn homojn / Estas ruze ! Tiel oni ne bezonas ilin serĉi !

Fine, kiuj estas tiuj famuloj ? Ili estas Franklin, Gutenberg, Kristoforo Kolombo... Kristoforo Kolombo, ni parolu iom pri li !

Jes, mi scias, ke li eltrovis Amerikon !... Sed kio ? ĉar ĝi ekzistis, li nur bezonis iri tien ! Vi kredas, ke mi ne estus eltrovinta ĝin, mi ? Ha, nu, kiel tio estas malfacila ! Estas vaporsipoj kiuj vin kondukas tute rekte.

Jes, sed tiam vi trovas personojn, kiuj diras al vi : « Permesu ! por Kristoforo Kolombo, Ameriko estis nekonata, tiam estis eltrovaĵo ! » Nu, kio ? Vi eble kredas, ke mi ĝin konas, mi ? Tiam, laŭ tiu rezono, se mi tien irus... estus eltrovaĵo ? Estas malspritegi ! Jes, mi bone scias, ke oni respondos al mi : « Ho ! pardonon ! Sed Kristoforo Kolombo estas la unua Eŭropano, kiu metis la piedon sur Amerikon / » Nu, tiam, la unua Amerikano, kiu estis rekondakata en Hispanujon... li do eltrovis Eŭropon, tiamaniere ? Vi vidas, ke tio ne povas esti rezonata. La homoj estas malspritaĵ, malspritaĵ, malspritegaj ! Ne parolu al mi pri tio ! vidu, mi suferas !

Ne, sed por reveni al tio, kion ni diris... ankoraŭ intrigulo estas Franklin...

Fine, kial li estas fama ? ĉar li eltrovis la fulmoŝirmilon ? Bone ! kio estas fulmoŝirmilo ? Ilo, kiu devas vin ŝirmi kontraŭ la fulmo, nu ! Prenu tri domojn... metu sur unu el ili fulmoŝirmilon, Faligu la fulmon... estas ĉiam sur la fulmoŝirmilon, ke ĝi falos ! Nu ! Kaj ĉu vi ne kredas, ke estas moki la homojn, tio ? Ha, ne, la homoj estas malspritaĵ, malspritaĵ, malspritegaj ! Ne parolu al mi pri tio ! Vidu, mi suferas !

Ankaŭ ekzemple la pentristoj... kial oni igas ilin famaj ?... ĉar ili bone scias pentri /... ne ! sed estus ridinde, se ili tute ne sciis pentri ! Nu, kio ? Kion tio pravas ? Ke ili havis bonajn profesorojn... ĉiu povas ilin havi, Sufiĉas pagi la taŭgan prezon !

Tiel, mia filo volis esti verkisto... mi lin malhelpis. Mi diris al li : « Mia filo, mi komprenas, ke oni skribas por la teatro, kiam oni estas nomata Molière, Shakespeare aŭ Schiller ! » Vi ne scias, kion li respondis al mi : « Sed, mia patro, ili ne estis ĉiam nomataj Molière, Shakespeare aŭ Schil-

ler ! » Estas naivege. « Sed ĉiam, mia filo !... de ilia naskiĝo ! » Tiam li kredis min embarasi, dirante al mi : « Tamen, se iliaj gepatroj estus malhelpintaj ilin skribi ? » Sed mi respondis al li : « Filo mia, estu certega, ke iliaj gepatroj estus malhelpintaj ilin skribi... se ili ne estus nomitaj Molière, Shakespeare aŭ Schiller ! » Tio lin mutigis ! Bum !

Tamen, se nur mi havus nomon... mi ja havas unu, mi estas nomata Merkuro ! sed se mi havus konatan nomon... Ha ! vi vidus, kiam mi estus fama... Mi tuŝetis tiom da fojoj la famecon ! Nu... Ekzemple... la fervojoj. Pro mi oni ilin havas ! Iam... mi estis juna ! mi iris por vespermanĝi ĉe amikoj sur la kamparo ! Tie estis Stephenson ! Mi diris dum la mango : « Dio mia ! Kiom estas laciĝi la ĉevalveturiloj ! Oni ja devus trovi ion pli rapidan kaj pli oportunan ! » Tri jarojn poste, Stephenson eltrovis la lokomotivon ! Jen ! Kiom tio estis malfacila ! Estis mi, kiu donis al li la ideon... la unuan ideon ! Nu, li estis fama, kaj mi, neniu konas min. Oni eĉ rifuzis al mi la senpagan trairon sur ĉiuj fervojoj !

Cu vi volas ankoraŭ pli proksiman ekzemplon ? Aŭskultu ! Doktoro Zamenhof ! kial do li estas fama ? Ĉar li eltrovis Esperanton ; kaj kio estas Esperanto ? Lingvo farita per vortoj ĉerpitaj el ĉiuj naturaj lingvoj, por ebligi al ĉiuj kiuj ĝin konas, interparoli ne estante komprenataj de aliaj personoj ! Kiom tio estas malfacila !

Sed mi, kiu parolas al vi, mi eltrovis jam de longe lingvon..., kiun la nekleruloj ne povas kompreni... kaj ĝi estas multe pli facila ol Esperanto, kiun oni proklamas kiel mirindaĵon de simpleco. Oni ĝin nomas « javanezo », mian lingvon, kaj ĝi povas esti ellernata post tri minutoj ! Tio mirigas vin, ĉu ne ? Ankoraŭ pli nekredeble ! Oni povas uzi ĝin por ĉiuj naturaj lingvoj ! Aŭskultu !... Mia lingvo konsistas el unu sola afikso AV, kiun oni metas antaŭ ĉiun vokalon ! Estas ĉio... Cu vi povus eltrovi ion pli simplan ? Ekzemple :

Angle : Good morning. *Javan-angle* : Gavood mavornaving.

France : Bonjour Monsieur. *Javan-france* : Bavonjavour Mavonsavieur.

Germane : Guten Morgen. *Javan-germane* : Gavitaven mavorgaven.

Esperante : Bonan tagon, gesinjoroj. *Javanesperante* : Bavonavan tavagavon, gavesavinjavoravoj.

Cu ne estas mirinde ? Nu, Zamenhof estas fama, eĉ fama, kaj mi nekonata...

Tial mi bone scias kion mi faros... Mi ne plu eltrovos ion ! Mi ne plu diros ion ! Oni ne povos preni ion de mi... kaj vi vidos la progreson !

POR VIA DISTRO

NIA KONKURSO 1962-63

Mi nenove memorigas al vi la ĉefajn punktojn de la regularo de nia konkurso :

1. — En ĉiu numero aperonta de « Kulturaĵoj » vi trovos du problemojn, ĉu enigmon, ĉu krucvortojn, ĉu tekston korektotan aŭ kompletigotan. La reĝustigitajn tekstojn aŭ la respondojn la konkursantoj sendu al :

Sro P. CHEVALIER

19, boulevard G.-Lauriol, Nantes (L.-A.) Francujo antaŭ la fino de la monato sekvanta tiun de la apero de la revuo (ekz. antaŭ la fino de Novembro por tiu-ĉi numero, antaŭ la fino de Januaro 1963 por la sekvanta, ktp).

2. — Kun la respondo — almenaŭ la unua — vi bonvole sendu la bandedolon de la gazeto, kiel atestilon de abonigo.

3. — La du gajnintoj de la du antaŭaj konkursoj ne rajtas partopreni la ĉiaran konkurson.

4. — La premioj konsistas el : a) 15-taga senpaga restado en Grésillon ; b) 8-taga senpaga restado en Grésillon.

5. — Se pluraj konkursantoj ricevas la saman nombron da poentoj, la premioj estos lotitaj inter ili.

1-a PROBLEMO

En ĉiu el la subaj frazoj troviĝas unu eraro. Bonvolu korekti ilin. Vi gajnos po 1-poento por ĉiu eraro ĝuste korektita, sed estos forprenita 1 poento por ĉiu malĝusta korekto.

- 1) La fiŝoj batis la akvon kun siaj naĝiloj kaj vosto.
- 2) Estus dezirinde, ke ni estos amikoj al ĉiuj nacioj.
- 3) Per pruntedono ofte oni perdas krom sia havo ankaŭ la amiko.
- 4) Mi preferus ĉambron je la unua etaĝo.
- 5) La soldatoj marŝis en perfekta ordo.
- 6) Precipe rigardu, ke vi en nenio superpaŝos la moderecon.
- 7) Sajnas al mi, ke mi jam vidis vin.
- 8) Aleksandro mortis kaj turniĝis en polvo.
- 9) La komitato renoviĝas per unu triono de la membroj ĉiujare.
- 10) Ni iradis ĉirkaŭe por trovi ŝian amikinin, kiun ŝi estis perdinta en la premado.

2-a PROBLEMO

Eltrovu la 26 vortojn, kiuj formas ĉenon tiel, ke ĉiu vorto komenciĝas per la meza silabo de la antaŭa vorto. La unua vorto komenciĝas per la meza silabo de la lasta vorto. Ĉiuj serĉotaj vortoj konsistas el tri dulteraĵ silaboj, do el ses literoj. Jen la signifoj de la vortoj :

1. Norditala urbo. — 2. Amerika mono. — 3. Antikva lingvo. — 4. Mezazia lando. — 5. Antaŭ-

nomo de Mussolini. — 6. Nova ŝtrumpmaterialo. — 7. Hinda akva floro. — 8. Malsanaĵo en la korpo. — 9. Malgranda korniko. — 10. Usona ŝtato. — 11. Gasforma akvo. — 12. Zamenhofa lando. — 13. Porinfana objekto. — 14. Bonodora floro. — 15. Serpentosimila fiŝo. — 16. Korda muzikilo. — 17. Bruligata kreskaĵo. — 18. Tropika frukto. — 19. Itala urbego. — 20. Ĉiuj homoj de unu lando. — 21. Marbesto kun suĉbrakoj. — 22. Malrapidega ĝardeno besteto. — 23. Parto de la tago. — 24. Pilkludo. — 25. Kemia elemento. — 26. Flava juvelŝtono.

La divenitaj vortoj oni skribu en la formo de listo (unu vorto sub la alia).

AMUZAĴ PROBLEMOJ (de S-ro Jarlier)

Solve de la antaŭa problemoj :

Paradokso : Estu du egalaj nombroj « a » kaj « b ». Ni skribu :

a = b. Ni multipliku la du nombrojn per « a » :
a² = ab.

Ni dekalkulu b² de la du nombroj :

ab - b² = a² - b²

b (a - b) = (a + b) (a - b)

Ni dividu la du nombrojn per (a - b) : oni havas : b = a + b

Do, b = 2b kaj 1 = 2

Eksplikoj : Tiu rezonado estas malĝusta. Fakte ni dividis la du membrojn per (a - b). Sed tio ne estas ebla pro tio, ke :

a = b, do : a - b = 0

Oni ne povas dividi per 0. Do la cetera rezonado ne validas.

— 0 — 0 — 0 — 0 — 0 — 0 —

LA LASTAJ DAKTILOJ :



Tiuj du Araboj posedas nur kelkajn daktilojn. Ili intencas partigi ilin egalkvante. Ili povas utiligi por tio nur falintan arbotrunkon. Sed la du ekstremoj de tiu trunko ne estas same dikaj. Por ĝin ekvilibrigi ili trovas apogpunkton pli proksime de la dika ekstremo ol de la maldika. Tiam, uzante saketojn ili metas ĉe ĉiu ekstremo daktilojn tiamaniere, ke la trunko ĉiam restu horizontala. Sed ĉe la fino, la daktiloj ne estas samnombraj en ĉiu saketo. Kial ?

BONHUMORO



— Ĉu viaj manoj estas puraj ?



— Ne plendu ! Estas landoj, kie la viroj havas plurajn edzinojn !



— Vi multe mankis al ni dum la ferioj.

Niaj perantoj

Aŭstrio : S-ro Johan Wieshofer, Wiener-Reichstrasse 2, LINZ (28 aŭst. ŝil.).

Belgujo : F-ino S. Obozinski, avenue Brugmann 364, BRUXELLES 18 (50 fcs).

Britujo : S-ro Frank Ashpole, 127 Midford Rd, Combe Down, BATH (7 ŝil.).

Nederlando : S-ro M. de Waard, Anemoonstraat, Capelle aan den IJssel, ZH pĉk : 209721 (3,5 guld.).

Germanujo (Okc.) : S-ro Joseph Bode, (16) KASSEL-Ndzw, Silberbornstr, 33 - pĉk : Frankfurt (M) : 234-759 (4 mark).

Germanujo (DDR) : S-ro Ernst Muthschall, 19a) HALLE (Saale), Am Bergmannstrost 18 - pĉk : Leipzig 510-28 (6 mark).

Hispanujo : Jozefino Monter Palomar, Muntaner 416, 1^a, 1-a, BARCELONO (55 pes.).

Italujo : S-ro Claudio Pontedera, Via Marco Polo 3A, Vercina (600 liroj).

Itala Esperanto-Federacio, Corso G. Galilei, 22, TORINO.

Jugoslavio : S-ro Lehcikay K. Fererĉ, ul Petefij eva 27, ZRENJANIN (300 din).

Norvegujo : S-ino Marit Delor, Oberst rodes veg 56, LAMBERTSEDER (7 kr.).

Danlando : S-ino Bodil Neergaard, Gothersgade 158, KOPENHAGO K (7 kr.).

Pollando : Asocio de Esperantistoj en Pollando, Nowy Swiat 27, VARSOVIO (30 Zlotoj).

Svedujo : S-ro Rune Palmgren, Persikogatan 32 III, Stockholm-VALLINGBY (5 kron.).

Svislando : S-ro Pierre Metivier, Via Ferrera, Ascona (Tes.) (4,5 sv. Frank.).

Usono : S-ro C.S. Otto, 32 Hazelwood Rd., Bloomfield (N.J.) (1 dol.).

Aliaj Landoj : Ni serĉas perantojn en aliaj landoj. Oni povas pagi la abonprezon per steloj (14 st.), aŭ respondkuponoj (10 respk.), per libroj, aŭ per neuzitaj poŝtmarkoj. Sin turni al S-ro Micard, Epineux-le-Séguin (Mayenne), Franc.



KASTELO GRÉSILLON

BAUGÉ

Maine-et-Loire

FRANCUJO

ESPERANTISTA KULTURDOMO

De junio ĝis septembro ĉiulandajn esperantistojn kaj eventuale iam ajn karavanojn frue anoncitaĵn

Akceptas :

Por ripozi trankvile en atmosfero frateca ;
Por eklerni aŭ plulerni la internacian lingvon ;
Por ĝin praktiki per interŝanĝo de ideoj ;
Por aŭdi kulturajn prelegojn ;
Por studi specialajn problemojn ;
Por inter amikoj gaje libertempi ;
Por ekskursi tra centro-okcidenta Francujo.

venu al la ESPERANTISTA KULTURDOMO

Kompleta Programo kun kondiĉoj havebla kontraŭ internacia respondkupono al :

ESPERANTISTA KULTURDOMO, Grésillon, BAUGÉ (Maine-et-Loire) Francujo